# *Komunistaj Partioj de Kubo kaj Hispanio pledas por pli fortaj ligoj*



**Foto: PL**

Havano, jan 25 (RHK) La unua sekretario de la Komunista Partio de Kubo, kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, esprimis la volon plifortigi la ligojn kun la Komunista Partio de Hispanio

(PCE), raportis la Prezidanteco.

En kunveno okazinta anta?tage en la Palaco de la Revolucio (?efstabejo de la Ekzekutivo) kun la ?enerala sekretario de la PCE, Enrique Santiago Romero, Díaz-Canel aludis al la neceso de komuna laboro pri aferoj de internacia intereso.

Mi pensas, ke estas multaj tutmondaj temoj; ke ni devas kundividi ideojn; anta? ?io, viziojn el niaj pozicioj, esprimis la prezidento, precipe – li diris – fronte al amaskomunikila manipulado de temoj rilataj al la vizioj de maldekstraj partioj, socialistoj, komunistoj, kaj anka? por la Tria Mondo.

La ?tatestro aludis anka? al temoj kiel la medio, a? la necesa energitransiro, kiun li konsideris esencaj, kaj malgra? nescio flanke de la malri?aj landoj, povas esti la vojo al solvoj .

Tiusence Santiago Romero argumentis, ke kapitalismo estas nekongrua kun la rajtoj de laboristoj, kun digna vivo, kaj “hodia? estas klare, ke tio estas “nekongrua kun la vivtenado de la planedo, de la ekosistemoj, kaj ?i estas risko de detruo por la homa specio."

Same, li esprimis, ke por  la Hiipana Komunista Partio  rilato kun la Komunista Partio de Kubo estas fundamenta, kaj elstarigis fruktodonan kunvenon okazintan la 23-an de januaro kun la Sekretario pri Organizo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo, Roberto Morales Ojeda.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/345374-komunistaj-partioj-de-kubo-kaj-hispanio-pledas-por-pli-fortaj-ligoj

**Radio Habana Cuba**